


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



Partoprenantoj de la Esperanto-perfektiga kurso apud la Balatono en 1983

1

2012

56-a jarkolekto



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervoĵista Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapeŝt
Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500
al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

2-a kovrilpaĝo: **I. Gulyás:** Kio okazos al MÁV?

1. **I. Gulyás:** Eventoj, rezultoj kaj planoj
4. **J. Halász:** Zamenhof-memorifesto en Nyíregyháza
5. **I. Pethes:** Post la 14-a IFEF-kongreso
9. **J. Patay:** Bukedo 2012 – ni klinas kapon antaŭ niaj pioniroj
13. **K. Orosz:** Dekkvin-jara pasinteco — kristana fervoĵista luktado
14. **J. Patay:** Fakaj informoj

3-a kovrilpaĝo: **J. Patay:** Primemoro pri fervoĵista kulturo

KIO OKAZOS AL MÁV?

.La morto de la hungara flugkompanio MALÉV, la agonio de la Budapeŝta Trafikentrepreno BKV montras la malfacilaĵojn sur la tereno de la hungaraj trafikbranĉoj. La ĉefa kaŭzo estas la manko de la financaĵo. La trafikentreprenoj bezonas multe da monoj, ja la statoj de iliaj trafikiloj, retoj kaj aliaj instrumentoj bezonas renovigon, rekonstrukcion, eĉ interŝanĝon. Ankaŭ multajn monojn bezonas la bontenada laboro kaj mem la funkciigo.

Tiu situacio estas sama ankaŭ ĉe la Hungaraj Ŝtatformoj (MÁV). La fervojaj trafikiloj – kaj la lokomotivoj, kaj la vagonoj – havas grandajn valorojn, kaj kompreneble la ŝanĝoj de tiuj iloj bezonas multegajn monojn. La fervojaj retoj, stacidomoj kaj rangostacioj, sekurigaj instalaĵoj, elektrizadoj, la bontenadaj bazoj ktp. eluziĝis, malmoderniĝis, kaj la ŝtato ne povas disponigi la bezonatan subtenon por renovigi aŭ interŝanĝi tiujn. Pro tio MÁV batalas por la vivteno, por la kontinua funkciado, por la realigo de la financa ekvilibro.

Kio estas la solvoj de la problemoj? Ne nur la monhelpo, sed oni devas raciigi la laboron, plibonigi la dividon de la taskoj inter la diversaj trafikbranĉoj, ĉesigi la paralelajn trafikojn, laŭ la pasaĝernombro oni devas ŝanĝigi la horaron laŭ la necesaj trajnoj ktp.

Ni hungaraj fervoĵistaj esperantistoj jam delonge ne ricevas subtenon de MÁV, sed ni ricevas financon helpon de la landa asocio de FISAIC (VOKE). Bedaŭrinde tiu organizaĵo ricevas la financaĵon por sia funkciado de MÁV, kaj la gvidanto de VOKE plendis pro la grava malpliigo de la subteno. Do pro tio ankaŭ nia helpo signife malkreskos. Sen mono neniu organizaĵo povas funkcii. Nia asocio devas pagi la funkciigajn elspezojn, la pres- kaj sendokostojn de nia faka revuo HFM kaj kelkajn aliajn kostojn. La membrototizo estas tro malalta ĉe ni, kaj bedaŭrinde malmultaj mendas nian revuon.

Ni esperu, ke la nuna ekonomia situacio pliboniĝos, kaj la Hungaraj Ŝtatformoj, kaj la landa asocio de FISAIC povos funkciigi. Eble tiam la Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio povos plu agadi senprobleme kaj plenumi la entreprenitajn taskojn.

István Gulyás

EVENTOJ, REZULTOJ kaj PLANOJ

Okaze de la jarŝanĝo ni devas rememori pri la gravaj eventoj kaj rezultoj de la pasinta jaro, kaj trapensi la novajn planojn kaj farendadojn por la nova jaro.

En la mezo de februaro nia asocio faris la ĝeneralan kunsidon, dum kiu – malgraŭ la neĝa kaj malvarma vetero – preskaŭ ĉiuj gvidantoj de la fakgrupoj (Budapest, Nyíregyháza, Debrecen, Kelebia-Kiskunhalas, Győr, Zalaegerszeg), kaj la prezidantoj de la du membroasocioj (Miskolc, Tata) partoprenis. Mankis la fakgrupoj Pécs kaj Szombathely pro malsano de la gvidantoj. Honorigis nian kunsidon la prezidanto kaj vicprezidanto de la Hungaria Esperanto Asocio.

La partoprenantoj aŭskultis kaj akceptis la raporton de la estraro pri la agado de la pasinta jaro, traktis la ekonomian situacion, akceptis la buĝeton kaj la laborplanon. Laŭ la raporto la membronombro ne ŝanĝiĝis, la asocio havas 543 membrojn, inter ili 30 IFEF-membrojn, 6 fakdelegitojn, 7 individuajn membrojn de UEA kaj 16 dumvivajn membrojn. Estas granda sukceso, ke la nombroj de la aktivaj membroj kreskis en la pasinta jaro. Estas malbona fakto, ke inter la membronombro de nia asocio pli ol 50%-j estas nur protektantaj membroj.

En la kadro de la fakgrupoj kaj membroasocioj okazis vigla klubvivo kun pluraj lingvokursoj, fakprelegoj, raportoj eĉ ekskursoj kaj ekspozicioj. Entute 32 personoj faris ŝtatan ekzamenon pri Esperanto.

Dum la ĝenerala kunsido de nia asocio la prezidanto informis la deputitojn pri la situacio de la landa kaj internacia Esperanto-movado. Li laŭdis la agadon de la nova IFEF-estraro, kaj kritikis la

malfortecon de la interrilato kun FISAIC. La prezidanto akcentis la ege bonan kunlaboron kun la landa FISAIC-sekcio kaj la landa asocio de UEA.

La plej grava parto de la ĝenerala kunsido estis la estrarelekto. Post longa kaj elĉerpita pritrakto formiĝis la nova estraro de nia asocio por kvar jaroj, jene:

Prezidanto:	István Gulyás	reelektita
Vicprezidanto:	D-ro Imre Pethes	reelektita
Vicprezidanto:	D-ro József Halász	reelektita
Sekretario:	D-ro József Bacsárdi	
Kasisto:	József Cziboly	

La trimembra kontrola komitato havas novan gvidanton, kiu estas D-ro Imre Ferenczy, la membroj de la komitato estas István Sutka (reelektita) kaj Miklós Zuberecz. Mi esperas, ke la nova estraro kontinue povos daŭrigi la laboron, kaj ĝi estas inda heredanto de la antaŭaj estraroj.

Fine la partoprenantoj de la ĝenerala kunsido per valoraj alparoloj kaj proponoj altigis la nivelon de la kunsido. Tiuj alparoloj formulis la plej gravajn taskojn kaj por la nova jaro, kaj por la hungaraj fervojistaj esperantistoj.

En la jaro 2011 okazis multaj interesaj eventoj kaj ĝojplenaj okazintaĵoj. La plej grava estis la 63-a IFEF-kongreso, okazinta en la pitoreska ĉeĥa urbo Liberec. Partoprenis ĝin entute 173 kongresanoj el 18 landoj, inter ili 15 personoj el Hungario. La kongreson eminente organizis la ĉeĥaj fervojistaj esperantistoj. La komitato de IFEF traktis multajn tagordpunktojn, akceptis la raportojn de la estraranoj, la ĉefkomitatano kaj la gvidantoj de la Faka Komisiono. La komitato laŭ la kongrespropono elektis novan redaktoron, kiel la kvinan estraranon. La komitatoj detale traktis la situacion de kelkaj landaj asocioj, taksis la



La prezidanto de la asocio raportas

interrilatojn kun UEA, FISAIC, SAT kaj UIC, akceptis la buĝeton kaj decidis pri la venontaj kongresoj. Dum la kongreso la partoprenantoj aŭskultis altnivelajn fakprelegojn, kaj faris multajn duon- kaj tuttagajn ekskursojn en la belega regiono de Ĉeĥio kaj en la ĉefurbo Prago, eĉ ni ĝuis interesajn kaj altnivelajn koncertojn kaj aliajn kulturajn programojn.

Alia interesa kaj neforgesebla travivaĵo estis la 96-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en la dana ĉefurbo Kopenhago. En la kongreso partoprenis 1458 esperantistoj el 66 landoj. La komitato ne nur dum la komitatkunsidoj, sed en ok subkomitataj grupoj traktis la aktualajn movadajn, lingvajn, klerigajn, financajn, landajn kaj fakajn temojn. En la tuta kongressemajno la partoprenantoj povis ĝui diversajn programojn kulturajn, sciencajn, ekskursajn, amuzajn kaj fakajn.

Dum la fervojista kontaktkunveno partoprenis 23

Hódmezővásárhely. En la historio de la renkontiĝoj en la pasinta jaro okazis unuafoje, ke la organizantoj ne estis fervojistoj, sed la lokaj medicinistaj esperantistoj. Ili eminente aranĝis la renkontiĝon, en kiu partoprenis pli ol 60 personoj. Bedaŭrinde eksterlandanoj ne venis malgraŭ la skriba invito. Multaj programeroj okazis, i.a. projekciado pri interesaj ekskursoj en la aliaj partoj de la mondo, pentraj- kaj ceramikaj prezentadoj, turmuziko, gaja vespera programo, laborkunsido. Dum la tuttaga ekskurso la partoprenantoj vizitis la faman hungaran historian memorlokon „Ópusztaszer”.

La printempa estrarkunsido de IFEF okazis en Parizo, en kies kadro la estraranoj traktis la plej aktualajn temojn, kaj faris enurban ekskurson. La aŭtuna estrarkunsido okazis en la itala apudmara urbo San Benedetto. Kiel kutime la estrarkunsido sukcesis bonege, kaj donis al ni neforgeseblajn travivaĵojn.



János Patay salutas la ĉeestantojn

kongrersanoj el 12 landoj, kie okazis prelegoj pri la kunlaboraj interkonsentoj, pri la lasta kaj sekva IFEF-kongresoj, pri la laborplano de IFEF, eĉ multaj alparoloj okazis, kiuj pliriĉigis la kunvenon. Okazis fervojfaka ekskurso, kiun pluraj gekolegoj partoprenis. La ekskurso kondukis nin al la bontenad-centro de la kopenhaga metroo, kaj estis ege interesa ne nur al la fakuloj, sed por ĉiuj ĉeestantoj.

La 43-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazis en la sudhungarlanda urbo

Bedaŭrinde okazis malbonaj eventoj en la pasinta jaro. La plej doloriga evento estis la morto de kelkaj eminentaj kaj ŝatataj esperantistoj enlande kaj eksterlande, inter ili Imre Nováki nia karmemora amiko el la fakgrupo Győr.

Apartenas al la malsukcesoj, ke en la kadro de la Esperanto-movado en Hungario plu daŭris la manko de la kunlaborado. Ni atendis, ke la landa Esperanto-kongreso, okazinta en la urbo Szolnok, kreas repaciĝon inter la hungaraj esperantistoj, sed vane. Mi ŝatus akcenti, ke ni fervojistaj

esperantistoj tenas la Hungarian Esperanto-Asocion la unusola kompetenta reprezentanto de la hungaraj esperantistoj, kiuj kaj enlande kaj internacie reprezentas niajn interesojn. Ni esperu, ke en la jaro 2012 trankviliĝos la situacio, kaj la hungaraj esperantistoj kunlabore agados por Esperanto.

Kio okazos, kaj kiel ni devos agadi en la jaro 2012?

Kiel ĉiujare la plej grava evento estos la 64-a IFEF-kongreso, okazonta en germana urbo Herzberg, kiu havas fieran baptonomon „Esperanto urbo”. La germanaj fervojistaj esperantistoj jam kvinfoje organizis IFEF-kongreson, kaj la nuna kongreso estos la sesa en la serio. En la kadro de la organiza laboro helpas kaj kunlaboras la Interkultura Centro Herzberg (ICH), kaj ni esperas, ke dum la kongreso ni travivos agrablajn tagojn.

La 97-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la fora lando Vjetnamio. Pro la granda distanco, kaj la tro varma vetero kun la vapora aero verŝajne multaj eŭropanoj ne partoprenos tiun. Legante la kongresajn materialojn, la informojn pri la ĉefurbo kaj la ĉirkaŭaĵo, mi pensas, ke ankaŭ tiu kongreso estos ekzotika kaj neforgesebla por ĉiuj partoprenantoj.

En la komenco de aprilo okazos la printempa estrarkunsido de IFEF en la franca urbo Angers kune kun la Franca Fervojista Esperanto-Kongreso. La estraro havas multajn gravajn temojn por trakti

kaj helpi la laboron de la komitato de IFEF dum la kongreso. Pri la aŭtuna estrarkunsido ni ankoraŭ ne decidis, sed mi esperas, ke ni trovos taŭgan lokon kaj cirkonstancojn por efike kunsidi.

La 44-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo okazos en la urbo Szeged. Ĝin organizas nia fervojista fakgrupo Kelebia-Kiskunhalas. La fakgrupo jam preparis la detalan programon, kaj ni povas konstati, ke la programeroj estos interesaj, la loĝ- kaj manĝeblecoj estos elstaraj, do mi esperas, ke tiu renkontiĝo daŭrigos la tradicion, kaj multaj fervojistaj kaj nefervojistaj esperantistoj, eĉ ankaŭ eksterlandanoj partoprenos tiun, kaj ni ĝuos la kunestadon en amika rondo.

Laŭ la akceptita laborplano por la jaro 2012 la hungaraj fervojistaj esperantistoj havas multajn planojn kaj taskojn, jene:

- ni daŭrigas la kunlaboron kun la landa FISAIC-sekcio, kaj kontinue raportas niajn agadojn al tiu;
- ni kunlaboras kun la Hungaria Esperanto-Asocio, kaj ankaŭ ni subtenas tiun organizaĵon por iĝi vera reprezentanto de la hungaraj esperantistoj;
- ni kunlaboras kun IFEF pere de la estrara posteno, kaj ni partoprenas en la aktiveco de la Redaktora Komisiono;
- ni kunlaboras kun UEA kaj kun aliaj Esperanto-organizaĵoj helpe de niaj aktivaj kaj helpopretaj membroj;
- ni daŭrigas la kunlaboron kun la internaciaj fakaj organizaĵoj (UMEA, MEM, ILEI, ISAE k.a.) por helpi la fakan laboron en la kadro de IFEF kaj



Partoprenantoj en la ĝenerala kunsido

UEA;

- ni disvastigas la interrilatojn kun la najbaraj eĉ aliaj landaj asocioj de IFEF pere de la invito al la Landa Amika Renkontiĝo kaj aliaj aranĝaĵoj;
- ni plifortigas niajn rilatojn inter la estaro de nia asocio kaj la fakgrupoj, eĉ la membroasocioj, pro tio la estraranoj regule vizitas la kunvenojn de la fakgrupoj resp. membroasocioj;
- ni aranĝas lingvokursojn por komencantoj kaj progresantoj, kaj por akiri bonan nivelon sur la tereno de la lingvolernado, – helpe de ILEI – ni certigas eminentajn lingvoinstruistojn;
- ni regule eldonas – kaj papere kaj elektronike – nian fakan revuon „Hungara Fervojista Mondo” por aperigi en ĝi fervojfakajn artikolojn, interesajn raportojn pri kongresoj, konferencoj kaj aliaj Esperanto-eventoj, eĉ ni donas spacon en nia revuo por kulturaj kaj literaturaj artikoloj;

- ni konigas nian ideon kaj la Esperanto-movadon pere de ekspozicioj, murgazetoj, lokaj radio- kaj televidstacioj;
- ni daŭrigas niajn aktualajn taskojn en la kadro de la fake aplika kaj de la terminara laboroj;
- ni instigas niajn membrojn por partopreni en Esperanto-kongresoj, renkontiĝoj kaj en la klubkunvenoj;
- ni donas helpon al la organizantoj de la ĉijara Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo;
- fine ni efektivas ankaŭ tiujn taskojn, kiujn ni ankoraŭ decidis en la laborplano de nia asocio.

Tiuj planoj kaj taskoj donas al ni multan laboron, kaj helpe de la nova estraro de nia asocio, ni realigos tiujn deciditajn kaj entreprenitajn taskojn. Al tiu agado mi deziras sanon kaj fortostreĉan laboron al ĉiuj niaj membroj.

István Gulyás

ZAMENHOF-MEMORFESTO EN NYÍREGYHÁZA

La fervojista Esperanto-grupo „Verda Stelo” en Nyíregyháza aranĝis sian tradician jarfinan kunvenon la 3-an de decembro 2011 la solenaĵo komenciĝis per la Esperanto-himno. Sekve tion Miklós Zuberecz, gvidanto de la grupo mallonge rememoris pri Zamenhof, parolante pri liaj vivo kaj agado.

Poste li retrorigardis la plej gravajn movadajn eventojn de jaro 2011. La fervojista grupo aktive agadis, ĝiaj membroj partoprenis diversajn aranĝaĵojn. Inter ili troviĝis tiuj, kiujn mem la grupo organizis, estis lokaj aranĝaĵoj, kiel la Karnavala Balo en Levelek, kaj estis landaj, mondaj aranĝaĵoj, kiel la Landa Amika Fervojista Renkontiĝo en Hódmezővásárhely, kongreso de HEA en Szolnok, aŭ Universala Kongreso en Kopenhago.

Li menciis kaj dankis tiun gravan helpon, kiun la grupo ricevis de la fervojista kulturdomo, kie la kunvenoj de la grupo okazas ĉiu semajne, kaj kie ili rajtas uzi ankaŭ la bibliotekon. En la biblioteko troviĝas ankaŭ Esperanto-libroj.

Sereghyné Enikő Zengő salutis la ĉeestantojn je la nomo de estraro de HEA. Ŝi parolis pri tio, ke estas ĝojige vidi novajn junajn personojn inter la ĉeestantoj. Unu el ili, Érika Balogh, kiu antaŭ nelonge akiris sukcesan lingvoekzamenon, deklamis la poemon de William Auld, titolitan „Bonan matenon Majstro”.

D-ro József Halász, je la nomo de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio salutis la ĉeestantojn. Li diris dankon pro la aktiveco de la grupo kaj deziris multe da sukceso por la estonta agado. La junaj membroj de la grupo prezentis gajajn humurajn scenojn, inter ili tiun, kiu temis pri tio



Partoprenantoj dum la Zamenhof-memorfesto

kiel ekzameniĝis Zamenhof pri lingvo Esperanto en Budapeŝto.

En la sekva parto de la memorfesto la ceestantoj povis aŭskulti la raportojn pri la travivaĵoj de tiuj personoj, kiuj partoprenis iun internacian aranĝaĵon. Inter ili Győző Gaál rememoris pri siaj spertoj en la Universala Kongreso en Kopenhago.

La direktoro de la kulturdomo Zoltán Mester salutis la partoprenantojn, li laŭdis la aktivecon de la Esperanto-grupo, kaj promesis sian helpon ankaŭ en la estonto.

Fine de la oficiala parto de la kunveno Sereghyné Enikő Zengő prezentis la laborplanon de la grupo por la jaro 2012. La aranĝaĵo daŭris per libera konversacio.

Ni gratulas al niaj diligentaj kolegoj en Nyíregyháza, kaj ni deziras al ili similajn rezultojn kaj sukcesojn por la sekva jaro.

D-ro József Halász

POST LA 14-A IFEF-KONGRESO

Unua parto

Jam pluraj kaj plurfoje publikis pri la 14-a kongreso kaj konigis ĝiajn eventojn, signifon.

Mi opinias, ke – kiel ankoraŭ vivanta membro de la tiama LKK – mi devas koncize revivigi la sekvajn plej gravajn eventojn kaj efikojn de tiu:

Okaze de la kongreso esperantaj flagoj ornamis la fervojajn limstaciojn, pli gravajn fervojajn oficejojn, la kongresejon, la stacidomojn de la ekskurslokoj. Krom la flagoj aktualaj slogantabuloj, kongresaj insignoj alvokis la atenton de la loĝantaro. Laŭparoliloj bonvenigis la kongresanojn ĉe la limstacioj, en la fervojaj stacioj kaj kongresejo. En ĉiu grava loko esperanto-parolantaj deĵorantoj informis la interesiĝantojn.

La alvenintaj kongresanoj ricevis riĉan kongresan pakaĵon enhavante la kongresan dokumentaron, prospektojn, kongresan libron, tekston de la fakprelego, informojn pri la kongresaj aranĝoj, gramafon-diskon (Himno de Esperanto, orkestra muziko, hungaraj popolkantoj esperantlingve), porokazan poŝtmarkon kaj ceterajn memoraĵojn pri Hungario. Aperis porokaza poŝtkarto, surloke funkciis poŝtoŭficejo uzanta specialan stampilon. Ĉiu kongresano ricevis senpagan vojaĝbileton por tutlanda reto de MÁV (validan por la 1-a klaso), eĉ ĝi validis por ĉiuspecaj urbaj publikaj veturiloj (krom taksio).

Elstara programo de la Kongreso estis la Amika Renkontiĝo por la junularo, kiam estis elektita la Internacia Komitato de Junuloj por helpi, organizi la venontajn junularajn aranĝaĵojn, agadojn. Ĝia prezidanto fariĝis D-ro Imre Ferenczy, liaj kunlaborantoj estis József Cziboly, István Gulyás, József Szabó kaj Lajos Csonka (1928-2006).

La kongresanoj amase partoprenis la laborkunsidojn. Tiuj okazis kun granda interesiĝo, same la fakprelego sub titolo „Evoluo de longrelaj kaj senbraĉaj trakoj en Hungario”.

Antaŭ la kongresejo fascina vidaĵo estis la viciĝantaj 35 novfabrikitaj modernaj aŭtobusoj, kiuj estis je la dispozo de la kongresanoj dum la urbovizito.


La tuttaga kongresa ekskurso okazis al la plej fama – eĉ internacie –, unika pro stalaktitoj kaj stalagmitoj groto Aggtelek. Impona dulingva marmortabulo estis lokigita sur la muro de la mondfama stalaktit-groto de Aggtelek por rememorigi la unikan grotan koncerton okazinta dum la 14-a IFEF-kongreso.



D-ro Imre Pethes

Alia ekskurso prezentis la „Hungaran Maron” nome Balatonon. Dum la ŝipekskurso la ĉefprotektanto de la kongreso gastigis la partoprenantojn per hungareca manĝaĵo kaj balaton-regiona vino.

Ambaŭ ekskursoj tien-reen okazis per specialaj trajnoj kaj aŭtobusoj, dekoraciitaj kun esperantoflagoj kaj kongresaj insignoj. Estis granda honoro por ni hungaraj fervojistaj esperantistoj, ke dum la solena fermo la prezidanto de IFEF akcentis: „Nun venis por mi la plej malfacila momento de la tuta kongreso: por fermi la ĝis nun plej grandnombran, bonsukcesan IFEF-kongreson, kaj en la nomo de la partoprenantoj esprimi varmkorajn dankojn al ĉiuj, kiuj laboris por la kongreso kaj helpis, apogis ĝian sukceson”. Li konstatis, tiu kongreso fariĝis „Kongreso de la entuziasmo”.



D-ro Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy

Post la kongreso la ministro István Kossa, kiel ĉefprotektanto de la kongreso per distingoj kaj premioj dankis al la membroj de LKK pro la rezultoriĉa laboro. La prezidano de LKK per



Konataj vizaĝoj en la 14-a IFEF-kongreso.

laŭnome adresitaj leteroj dankis la sinoferan laboron de la helpantoj.

La sukceso de la kongreso donis novan energion al ni ĉiuj, por ke kun freŝa forto ni direktigu al la sekunda celo, ni efektiviĝu la taskojn laŭ la direktivoj de la internaciaj organizaĵoj, ni garantiu la sukceson. Ĉiu fervojista esperantisto tenis la taskojn propra devo, zorgema, rezulta kunlaboro helpis la efektiviĝon de la taskoj. Al tiuj kontribuis ĉiuj eventoj, pri kiuj mi faris koncizan mencion, sed mi mencias, ja ili okazis.

Tiutempe en Budapeŝto ekfunkciis speciala fervojista Esperanto-Klubo. Dum longaj jardekoj ĝi estis fama eĉ eksterlande, ja ĝi daŭre havis altnivelajn programojn, altrangaj personoj prelegis, ekz. D-ro Kálmán Kalocsay, Julio Baghy, Lajos Kökény, Alfonz Pechan, krome multaj eksterlandaj famuloj, ekz. Werner Bormann el Germanio, Petro Poliŝĉuk el Uzbekio, eĉ la prezidanto de UEA Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario de UEA D-rino Flóra Szabó-Felső, kaj multaj ceteraj. Ĉiusemajne 60-100 interesiĝantoj vizitis la klubon, kio havis ankaŭ riĉan bibliotekon.

La asembleo de la Hungara Esperanto-Asocio (HEA) por la 1963-1965-jara periodo elektis al si ĉefsekretario nian kolegon Lajos Kapitány, fervoja inĝeniero. Li bonege plenumis tiun taskon kaj akiris grandan reputacion al hungaraj fervojistaj esperantistoj.

Inter la 1965-1980-aj jaroj HEA laŭeble ĉiujare aranĝis simpozion en urbo Gyula sub la nomo „Somera Esperanto-Universitato”. Multaj interesiĝantoj partoprenis ĝin eĉ el eksterlando, ja altkvalifikaj eminentaj esperantistoj, universitataj profesoroj prelegis, inter ili ankaŭ kelkaj hungaraj fervojistaj esperantistoj.

Antaŭ la kongresoj kaj poste la fervojistaj esperantistoj kaj la grupoj tre aktive laboris. La nombro de la grupoj je pli ol 20, kaj la Fervojista Fakoj de Hungara Esperanto Asocio (HEA) fariĝis la plej granda kun mil membroj, sed ne nur nombre, eĉ aktive.

Helpis la propagandan laboron la fervojista budapeŝta grupo – kies estro estis D-ro Mihály Szegeđi – kiu ankaŭ altnivelajn ekspoziciojn aranĝis dise en la lando, kaj lia grava laborperiodo estis la terminara laboro.

En la jaro 1968 sukcesis eldoni la poŝtforman Fervojan Terminareton kun konciza gramatiko en variantoj hungara-Esperanto kaj Esperanto-hungara, en mil ekzempleroj.

La hungara terminara grupo dekomence partoprenis ankaŭ la internacian terminaran laboron de IFEF por traduki la seslingvan UIC leksikonon (UIC = Union Internationale de Chemins de fer – Internacia Fervoja Unio). Cetere tiu laboro seninterrompe daŭras, nuntempe jam ĝi estas dudek-lingva (inter ili ankaŭ en Esperanto) kaj aperadas laŭ la plej moderna sistemo per disko CD-ROM.

Nepre estas menciinda la unika entrepreno de D-ro István Bácskai kaj Sarolta Fülöp, ili finredaktis kaj tajpe pretigis notojn de Komerca Vortaro kun var-nomaro Hungara-Esperanto, verkita de profesoro Károly Endre. Ĝi enhavas trezoron de fakaj terminoj por komercistoj kaj transportistoj sur 2400 tajpitaj paĝoj. Unu kompleta kopio de tiu estas transdonita al IFEF estraro.

La landa asocio havas hungaran sektion de Terminara Komisiono de IFEF, kiu seninterrompe kunlaboras kun tiu de IFEF. Ĝi okupiĝis pri la taskoj ricevitaj de la Terminara Komisiono de IFEF. D-ro Mihály Szegeđi direktis tiun laboron dum pli ol du jardekoj, poste D-ro József Halász, fine Ferenc Phersy la juna - eĉ nuntempe. Sekvante la eblecon de fakaj kaj esperantaj kontaktoj D-ro József Halász dum pluraj jaroj gvidis la Fakan Komisionon de IFEF, kaj direktis la laboron de la hungara fervoja fakterminaro de IFEF.

La dua eldono de RailLexic CD-ROM pri „Fervoja Terminaro en Esperanto” estas tradukita al Esperanto/13 naciaj lingvoj kaj inverse. Pere de HFEA MÁV eldonis ĝian libroforman varianton. La klariga teksto de la 16-voluma Telefonlibro de la Hungara Telekomunikada AS aperas ankaŭ en Esperanto krom kelkaj ceteraj fremdaj lingvoj.

La IFEF-kongresoj en Avignon (1969) kaj en Tarragona (1974) elektis d-ron István Bácskai kiel



E. Kruse kaj J. Giessner dum la komitatkunsido.

komitatano „A” de UEA por IFEF. En tiu funkcio D-ro Ferenc Phersy sekvis lin (1976) sed pro lia grava malsano ekde 1980 dipl. inĝ. István Gulyás transprenis de li kaj eĉ nun plenumas tiun



Partoprenantoj de la kunsido de la Faka Komisiono

respondoplenan kaj honorigan postenon.

Por akceli la movadan laboron kaj plialtigi la rezultojn dise en la lando, la estraro de la Fervojistaj Fakoj de HEA kunlabore kun la Fervojista Sindikato, ekde jaro 1969 dum multaj jaroj aranĝis t.n. pliperfektigan kurson por la aktivuloj de esperanto-grupoj, eĉ ne nur por fervojistoj, sed ankaŭ tiuj de nefervojistaj grupoj. Tiuj okazis en ĉebalatonaj fervojaj ripozejoj de Zánka, Balatonkenese, krome en loko Gárdony; kaj daŭris unu semajnon, kies estro estis Szilárd Bálint, kiu partoprenis en la redaktada laboro de altnivela eldonaĵo „Hungara Vivo”. Ĝiaj temoj estis: movadaj labormetodoj, movadhistorio, pliperfektigo en lingvoscio, pliprecizigi la movad-financajn farenadojn, interŝanĝi la labormetodojn. En ĉiu temo prelegis eminentaj fakaj gvidantoj de la landa movado, kion ĉiam sekvis konsultado.

En la Fervojista Esperanto-Movado en tiu periodo aperis János Patay, kiu senlace laboris kiel sekretario de nia sekcio (dum 25 jaroj), redaktoro de HFM (dum ok jaroj), komitatano de IFEF (dum 15 jaroj). Li gvidis multajn lingvokursojn, prelegis en multaj kluboj, verkis artikolojn, kaze de arangaĵoj li ofte ĉiĉeronis. La fervojistaj esperantistoj ĉiam povis kaj ankoraŭ povas trovi lin se ie, iam, ion oni devas labori. Li vere meritis ricevi la distingon „Honora Membro de IFEF”.

La fervojista sekcio de HEA ĉiujare organizas kaj aranĝas landan amikan renkontiĝon kun 50-100 partoprenantoj kun familianoj, eĉ programoj. Partoprenas ĝin ankaŭ ne fervojistoj, eĉ kelkaj eksterlandanoj.

Ekde multaj jaroj ĉiujare okazas laborkunsido de fervojista sekcio, kiam la estraro raportas al la delegitoj de la fakgrupoj pri la faritaj laboroj, rezultoj, movadaj temoj, problemoj, budĝeto, laborplano, tio ĉiam harmonias kun tiuj de HEA, IFEF kaj UEA.

La jaro 1982 estis granda kaj grava de nia movado, ĉar la delegitoj de la laborkunsido proponas refoje inviti la IFEF-kongreson al nia lando. Akirante la permeson de la ŝtataj instancoj, la Fervojista Sekcio de la Hungara Esperanto-Asocio – post dudek jaroj de la bonsukcesa 14-a IFEF Kongreso – invitis kaj ricevis la honoran taskon organizi/aranĝi IFEF-Kongreson en Hungario.

La 34-a IFEF-Kongreso okazis inter la 2-a kaj la 8-a de majo en la ĉebalaton fama kuraĉloko Balatonfüred. La kongreso rezidis en la plej moderna kaj belega Instrua Centro de la Landa Konsilantaro de Sindikatoj (SZOT - Szakszervezetek Országos Tanácsa). Speciala honoro estis por la kongreso, ke la konstruaĵo mem komencis funkcii per la aranĝo de tiu ĉi kongreso.

La estraro de IFEF, la komitatanoj de IFEF kaj la plej rezulte laborantaj eksterlandaj movadanoj ricevis senpagan fervojbileton de MÁV.

LKK konsistis el la sekvaj: prezidanto István Gulyás, sekretario János Patay, kasisto Imre Domokos, membroj Ferenc Phersy, D-ro István Keresztes kaj László Zseni.

La estraro de SZOT invitis la estraranojn, honorajn membrojn (ĉiujn kun familianoj) kaj membrojn de LKK al la ĉeftribuno de Budapeŝto spektakli la paradmarŝon de centmiloj okaze de la maja festo. Post la parado SZOT gastigis la honorigitajn gastojn per festa tagmanĝo; poste per aparta buso ili vojaĝis al la kongresurbo. La kongresanoj per speciala trajno veturis al Balatonfüred, kiu konsistis el elegantaj, unuaklasaj vagonoj. De la stacidomo specialaj aŭtobusoj transportis la kongresanojn al la kongresejo. La kongresanoj sen tumulto tre rapide povis okupi la hotelĉambron, rezulte de la lerta organizo de LKK



D-ro I. Bácskai en la Esperanto-ekspozicio.

malgraŭ tio, ke la nombro de la partoprenantoj estis 605 el 23 landoj. LKK enkondukis specialan iniciaton: propagandocele unu junulo (sub 30 jaroj) de ĉiu lando senpage partoprenis la tutan kongreson (inkluzive tranoktadon, provizadon, ekskursojn), por allogi junulojn al la movado.

La 110-paĝa eleganta kongreslibro abunde kaj detale informis pri ĉiu sciindaĵo kaj programeroj.

Speciala buso veturigis la kongresanojn al malproksime situanta preĝejo por partopreni ekumenan diservon. Dum la inaŭguro D-ro Erwin Semmelrath, la reprezentanto de FISAIC parolis pri la ekzemplodona agado de D-ro Bácskai, kaj transdonis al li la plej altan honorigon de FISAIC: la oran medalon.

La kulturprogramoj, orgenkoncerto en miljara abatejo Tihany, la ekskursoj donis neforgeseblajn

travivaĵojn al la partoprenantoj. La kompleta galerio de la urbo estis je la dispono de la kongreso por prezenti la historion, literaturon, la ĉiurilatan movadon de Esperanto, prezenti ne nur al la kongresanoj, sed al la publiko.

La programoj de la kongreso okazis laŭplane, ĉio estis bone aranĝita, pro tio en la solena fermo la prezidanto de IFEF jene taksis: „La sukcesinta kongreso meritis la titolon: Kongreso de bonkoreco”. Per plantado de memorarbo (nome tiliido) en la parko de la kongresejo oni finis la kongreson.

La sukceso de la 34-a IFK rezultis grandan eĥon kaj enlandan kaj internacian, pro tio la Hungara Esperanto-Asocio en jaro 1983 honoris kolektive la LKK-n per la distingo de HEA „Pro Esperanto” memormedalo.

Tiu ĉi kongreso donis utilajn spertojn por ke la fervojistaj esperantistoj grandparte kontribuu al la sukceso de la sekvajara 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝt. Vere, multaj fervojistaj esperantistoj partoprenis en tiu kongresa laboro kiel helpantoj, eĉ funkciuloj.

Elstara rezulto de nia agado estas, ke dekomence ĉiujare kvarfoje kun eleganta eksteraĵo kaj altnivela enhavo aperas faka revuo Hungara Fervojista Mondo, kiu havas eĉ internacian rekonon. Ĝiaj motoroj estas István Gulyás, János Patay, József Cziboly.

La fervojista fako de HEA havas la meriton por ekfunkciigi la Hungaran Sekcion de FISAIC (Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots - Internacia Fervojista Federacio por Kulturo kaj Libertempo). Dum longaj jaroj nia landa organizaĵo sole estis Hungarlanda Sekcio de FISAIC, sed per nia interveno pli poste jam ok hungaraj fervojistaj organizaĵoj aliĝis al FISAIC, kiu ankaŭ finance helpis la movadon.



Szilárd Bálint, la entuziasma Esperanto-aktivanto

Dum la mezo de la 1980-aj jaroj MÁV ĉiujare eldonis (ĉ. dudek-paĝan) broŝuron en diversaj lingvoj (angla, franca, germana, hungara, rusa), per kio konigis al la publiko la organizan strukturon de MÁV, diverstemajn gravajn publikinteresajn indikojn pri MÁV. Tiuj broŝuroj aperis ankaŭ

en Esperantanto por la interveno de la estraro de la Fervojista Sekcio de HEA!

Bedaŭrinde la ekde 1962 aperinta esperanto teksto en la horarlibro de MÁV jam ne aperas.

Krom la fervojista fako la landa Esperanto-organizaĵo havis eĉ ceterajn fakajn sekciojn. Inter



E. Kruse kaj J. Patay antaŭ la memortabulo en la groto Aggtelek

ili troviĝis la Poŝtista Sekcio. La 1989-jara reĝimŝanĝo tutlande kaŭzis ĝeneralan ekonomian dekadoncon, kio ĉiam pli negative efikis je la movada vivo, ja ĝi rezultis malkreskon de la membraro. Pro tio en la jaro 1991 la Poŝtista Sekcio de HEA unuiĝis kun la Fervojista Sekcio. Samtempe pluraj fervojistaj fakgrupoj provizore ĉesis funkcii pro la ĝenerala ekonomia malboniĝo en la lando, ja ne nur ekaperis, sed daŭre kreskis la ĝenerala senlaboreco, grave malkreskis la vivonivelo, ĉiam pli malfaciliĝis la ĝenerala vivteno.

La landa IFEF-organizaĵo plurfoje donis hejmon al IFEF-estraro (en Budapeŝt kvarfoje, po unu en Győr, Pécs, Sopron, Mezőkövesd) por aranĝi estrarkunsidon - inkluzive eĉ kulturajn aŭ turisman programojn - post kiam, nia prezidanto inĝ. István Gulyás fariĝis estrarano de IFEF.

Ĝenerale estas konata la altruisma, multflanka agado de grafo István Széchenyi, per kiuj li akcelis la evoluon kaj prosperon de Hungario. Li dediĉis ĉiun sian kapablon por levi nian patrujon el la primitiveco, senkultureco kaj prepari la renaskiĝon de la patrujo. Li estigis la vapor-ŝpiradon, preparis la planon de la hungara fervojreto. Ni havas la devon utiligi liajn multflankajn „konsilojn, instrukciojn” ĉe la solvo de niaj ĉiam pli malfacilaj taskoj. Ĝi estas precipe grava ĉe la trafika labortereno, ja li sistemigis la fundamenton de la interkomunikado. Je la memoro de liaj eksterordinaraj faroj estis lokigita memortabulo sur la muro de Pesti Vigadó (Amuzejo de Pest).

Post la refondiĝo de la Rumana Fervojista Esperanto-Asocio la landa organizaĵo kontribuis al ilia plifirmigo per valoraj konsiloj kaj donaco de lernolibroj.

D-ro Imre Pethes

B U K E D O – 2 0 1 2

NI KLINAS KAPON ANTAŬ NIAJ PIONIROJ

Jam fariĝis tradicia, ke de jaro al jaro ni rememoras pri niaj pioniroj okaze de ilia (relative) rondcifera datreveno. Nia celo ne estas ekŝirigi la vundojn de la koro pro la perdo de niaj pioniroj, samideanoj, sed refreŝigi ilian memoron – ja, ĉe enterigaj ceremonioj ofte ni promesas: „Ni konservas Lian/Sian memoron”.

Jen, ni rememoru, ni prenu ekzemplojn, ideojn pri iliaj iamaj penadoj en la movado:

Antaŭ 125 jaroj...

...naskiĝis **Stevan V. Stojniĉ** (1887-1963) fervoja oficisto, kiu akiris diplomon en la Oficirkleriga kaj Pliperfektiga Instituto de MAV; kaj deĵoris ĉe la funkcia servo de MAV en diversaj stacidomoj. Post la unua mondmilito li transloĝiĝis, kaj repatriiĝis al Jugoslavio. Daŭre li partoprenis en la movada laboro de Esperanto, eĉ pli poste gvidis entuziasme la fervojistan Esperantomovadon, kiel prezidanto de tiu dum 8 jaroj.

*

Antaŭ 120 jaroj...

...naskiĝis **D-ro Lajos Győry-Nagy** (1892-1980), membro de UEA, prezidanto de la Borsod-departementa Teritoria Komitato de HEA. Li subtenis ĉiun bonan ideon por progresigi Esperanton ankaŭ inter la fervojistoj. Lia vivprincipo estis: „Vivi kaj labori por la progreso, por la liberiĝo kaj por la prospero de la subpremitaj klasoj, agadi dum jardekoj por la alproksimiĝo de la diversaj nacioj, ankaŭ por Esperanto”. – Tio estas la ĉefa enhavo de lia longa vivo.

*

Antaŭ 115 jaroj...

...naskiĝis **Lajos Kőkény** (1897-1985), Honora Membro de UEA, senlaca kunlaboranta membro de la t.n. Budapeŝta Skolo de Esperanto kune kun D-ro Kálmán Kalocsay, Julio Baghy, Lajos Tárkony. Dum jardekoj li estis aktiva membro, preleganto kaj kunlaboranto de la Klubo Julio Baghy, verkisto de HFM per siaj ĉiam aktualaj kaj valoraj kontribuoj. Li estis entuziasma adepto de Esperanto, instruisto de la lingvo, eĉ aŭtoro de E-lernolibro. Kiel parlamenta stenografo li varbis simpatiantojn al Esperanto eĉ inter la parlamentaj deputitoj. Li estis prezidanto de la Hungarlanda Esperanto-Societo; ĉefredaktoro de Hungara Vivo, tiu de Hungara Heroldo kaj Hungara Jarlibro; mezlerneja profesoro de historio, hungara lingvo kaj literaturo; ĵurnalisto; verkisto de artikoloj, ĉefa redaktoro de la baza verko „Enciklopedio de Esperanto”, tradukisto de noveloj. Li verkis ampleksan

historion de la VIII-a distrikto de Budapest.

...naskiĝis **Ferenc Egry** („Onklo Feri” de ĉiu; – 1897-1985) gvidanto de la Fervojista Fakgrupo en Dunakeszi, tiu de lingvokursoj, prezidanto de la Teknikista Komisiono de HEA, kunlaboranto de Hungara Esperantisto, tradukanto kaj verkanto de fakaj teknikaj artikoloj, kunlaboranto de Hungara Fervojista Mondo kaj Hungara Vivo, kunredaktanto de la Fervoja Terminareto, verkisto de noveloj, gvidanto kaj paralele bibliotekisto de la Klubo Julio Baghy, preleganto en diversaj kluboj.

...naskiĝis **Sándor Szathmáry** (1897-1974) E-verkisto, publikiganto de noveloj; tradukis el Esperanto al hungara lingvo; li tradukis la romanon de Cezaro Rosetti „Kredu min Sinjorino”; same la ampleksan novelaron sub titolo „Kazohinio”.

*

Antaŭ 110 jaroj...

...naskiĝis **Kornelio Gjalt Jogchem de Jong** (1902-1985), vaste konata kaj ŝatata esperantisto, teknika inspektoro de la Nederlanda Fervojo. Li estis kursgvidanto, verkisto de artikoloj, preleganto, redaktoro de IFEF-periodaĵo (1950-58), prezidanto de IFEF (1958-1968), Honora Membro de IFEF, Honora Prezidanto de IFEF (postmorte), honorita per ora medalo de FISAIC. Li multe akcelis kaj kontribuis, ke la hungara fervojista E-organizaĵo fariĝu la membro de IFEF. Li grave helpis la preparlaboron de la 14-a IFEF-kongreso, kaj ties sukceson.

...naskiĝis **Imre Baranyai** (EMBA; 1902-1961) pentrajaganto, ĝardenisto, fervorulo de la hungara laborista Esperanto-movado; aŭtoro de lernolibro, verkisto, Esperanto-poeto. Granda simpleco, senpera transdono de pensoj kaj naivaj ĝojoj karakterizas lian poezion.

...naskiĝis **Lajos Korsós** (1902-1990) „esplora delegito” de la postmilita fervojista E-movado (karese: „vojaĝanta ambasadoro de Esperanto”), – vojaĝis tra la lando por propagandi kaj organizi la fervojistan Esperantomovadon. Li kolektis poresperantan propagandan

materialon kun abunda argumento, kion li sendis al la plej diversaj funkciuloj de sociaj, kulturaj funkciuloj, fakaj estroj. Entuziasme li gvidis kursojn en diversaj gradoj, fondis grupojn, organizis kaj disvastigis la movadon. Signifa estas lia studado sub titolo: „La hungara lingvo kiel fariĝas mondlingvo?“, en tiu li faris lingvan komparon kun pluraj fremdaj lingvoj.

...**naskiĝis D-ro Károly Rödönyi** (1902-1995), estinta ĝeneraldirektoro de MÁV, poste ministro de Trafiko kaj Poŝto. Li estis membro de la Hungara Scienca Akademio, prezidanto de UIC, kaj membro de la Honora Patrona Komitato de IFEF. Kiel ĝeneraldirektoro de MÁV li subtenis la laboron de la fervojistaj esperantistoj kaj morale kaj finance. Li akcelis la instruadon de lingvo Esperanto en la Fervoja Oficir-kloriga Instituto de MÁV.

...**naskiĝis Lajos Tárkony** (Totsche; 1902-1978) originala E-poeto, membro de la Esperanto Akademio. Li estis kunlaboranto de Alfonz Pechan kaj D-ro József Mátéffy, organizanto de studenta Esperanto-movado, same de radioelsendo en Esperanto, kunlaboranto de Literatura Mondo kaj Bibliografia Gazeto. Li kontribuis al parto de la Hungara Antologio; li estis kunlaboranto de diversaj revuoj, intima amiko de Kálmán Kalocsay.

*

Antaŭ 105 jaroj ...

...**naskiĝis László Boronkay** („Onklo Laci“; 1907-1989) entuziasma membro de lerneja ĥoro, lingvaj kaj belartaj grupoj, eminenta fakulo kaj instruisto de Esperanto, kompilanto de instru-materialoj, ĉefe por fervojistoj. Li estis eminenta intruisto de la internacia lingvo, li partoprenis en perfektigaj instruadoj, en fakaj kaj Esperanto-movadaj seminarioj. Daŭre li verkis fakajn artikolojn, prelegis en kluboj. Ekzemplodone li partoprenis la traduklaboron de la seslingva leksikono de UIC. Multe li kontribuis al la vigligo de la kluba vivo de fervojistoj, entuziasme li partoprenis en ĉiuspeca komuna movada laboro.

*

Antaŭ 90 jaroj...

...**naskiĝis D-ro Lajos Márton** (1922-1978). Post la dua mondmilito la Esperanto-movado devige silentis. En 1956 aperis

ministeria dekreto, laŭ kiu la hungara Esperanto-movado refoje povos agadi en la kadro de la Popolkleriga Ministerio sub nomo de Hungara Esperanto-Konsilantaro. L. Márton tre aktive partoprenis la organizon laboron de la Hungara Esperanto-Konsilantaro, kaj oni elektis lin ĉefsekretario de tiu.

...**naskiĝis Elizabeta Pallos** (1922-1995), kiu preskaŭ kvardek jarojn entuziasme laboris por Esperanto-movado, eĉ eksterlande. Dum multaj jaroj ŝi estis estrarano de HEA, prezidanto de Baranya-departementa Teritoria Komitato de HEA. 25-foje ŝi aranĝis Internacian Renkontiĝon Naturamikan (IREN) en Abaliget, krome ŝi estis ĉeforganizanto de TEJO aranĝita en Pécs (1966). Ŝi estis LKK-membro de la 47-a IFEF-Kongreso en Pécs.

*

Antaŭ 85 jaroj...

...**naskiĝis kaj antaŭ 5 jaroj mortis Lajos (Ludoviko) Szekeres** (1927-2007). Li estis fervoja inĝeniero, loĝis en jugoslavia urbo Senta. Kiel fervojista esperantisto li aktivis en la Jugoslavia Asocio de Fervojistaj Esperantistoj; inter alie kiel prezidanto. Lia plej grava agadkampo estis la fervojfaka terminologio. Li kunverkis la terminareton sub titolo „Fervoja Terminareto“, ĝi havis variantojn „Esperanto-serbokroata kaj serbokroata-Esperanto“. Li estis membro de la Terminara Komisiono de IFEF, intertempe eĉ gvidanto de tiu.

*

Antaŭ 75 jaroj...

...**mortis Ilia Puhalo** (1899-1937), vicprezidanto de la Internacia Asocio de la Fervojistoj-Esperantistoj (IAEF; inter 1924-1930), kaj samtempe li estis la redaktoro de la faka revuo „La Fervojisto“. Li kunlabore kun la prezidanto de IAEF Stevan V. Stojniĉ agadis sur la tuta asocia labortereno, faris el „La Fervojisto“ seriozan internacian fakrevuon, plenumis ĉiujn administrajn farendaĵojn, membreregistradon, korespondadon, ktp. Lian larĝskalan kaj entuziasman agadon interrompis grava malsano, kaj jam en sia 38-jaraĝo li mortis. En la nuna jaro la kroataj esperantistoj – en la kadro de la Kroata Esperanto-Kongreso – starigos memortabulon al I. Puhalo en la apudlima urbo Koprivnica.

Antaŭ 70 jaroj...

...naskiĝis **Zsuzsa Barcsay** (1942-2000) pedagogo, kunlaboranto de D-ro István Szerdahelyi en la oficiala organizado de tutlanda lerneja instruado de lingvo Esperanto. Ŝi estis aktiva membro de ILEI, kunlaboranto de la eksperimenta lerneja instruado de Esperanto kadre de UNESCO.

*

Antaŭ 65 jaroj...

...naskiĝis **Tibor Papp** (1947-2003, Debrecen) eminenta, tre inteligenta, diligenta, agema esperantisto, motoro de la Esperanto-movado en la urbo Debrecen kaj tiu de la Departamenta Komitato de Hajdú-Bihar, kunlaboranto de la loka fervojista E-Fakgrupo. Li fondis la altnivelan kaj tre popularan revuon „Debrecena Bulteno”. Precize li flegis la lingvoscion inter esperantistoj, gvidis diversgradajn kursojn; verkis la biografon de Debrecen, tradukis poemojn, librojn el hungara al Esperanto.

...naskiĝis **Oszkár Princz** (1947-2004) diplomita publika klerigisto, profesia esperantisto. Li estis tre aktiva membro de la E-movado, havanta gravajn enlandajn kaj internaciajn postenojn. Li estis gvidanto de la Centra Oficejo de HEA, pli poste sekretario, eĉ pli poste ĝenerala sekretario de HEA; delegito kaj komitatano, pliposte estrarano de UEA. Li prilaboris strategion por landaj asocioj; organizis multajn lingvokursojn, libroeldonejon de HEA, Esperanto-vojaĝagentojn. Li estis kunlaboranto de HFM. Pro lia multflanka, tro ŝarĝa, respondplena kaj preciza laboro elĉerpigis lia energio, relative junaĝe li forpasis.

*

Antaŭ 55 jaroj...

...mortis **Mihály Zsámboky** (1885-1957). Post la unua mondmilito en 1918 li kunlaboris en la refondiĝo de Hungarlanda Esperanto-Societo Laborista (HESL). Post la dua mondmilito li laboris ĉe MÁV en Keleti-pályaudvar (Orienta Stacidomo) de Budapeŝt. Poste li laboris en la centro, kiam oni fondis la Fervojistan Sindikaton. Tie li okupiĝis pri pensiaj aferoj kaj multe agadis por la fervojista Esperanto-Movado. Li estis „esplora delegito” – kune kun Lajos Korsós – de la postmilita fervojista Esperanto-movado (karese oni nomis lin „vojaĝanta ambasadoro de Esperanto”), – ja li vojaĝis tra la lando por propagandi kaj organizi la fervojistan Esperanto-movadon.

*

Antaŭ 50 jaroj...

...mortis **László Heckenaszt** (1929-1962) fervoja ĉefingeniero, fondinto kaj gvidanto de la fervojista Esperanto Fakgrupo en Budapeŝt-Ferencváros. Li estis entuziasma helpanto dum la 14-a Kongreso de IFEF. Li tradukis poemojn al Esperanto.

*

Antaŭ 45 jaroj...

...mortis **Julio Baghy** (1891-1967), elstara talento de la Esperanto-literaturo kaj Esperanto-movado, prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio, komitatano „A” kaj Honora Membro de UEA. Li estis membro kaj vicprezidanto de la Esperanto Akademio; arta tradukisto; aŭtoro de Esperanto lernolibro.

...mortis **D-ro Ignác Balla** (1889 – 1967) konata advokato, urba prokuroro en Pécs, fidela esperantisto, kunlaboranto de Julio Baghy kaj Mihály Sárossy en la rusa militkaptitejo dum la unua mondmilito. Li estis kursgvidanto por diversnacioj en la militkaptitejo, post la liberiĝo ankaŭ en Pécs. Post emeritiĝo li vivis en Budapeŝt kaj estis fervora membro de la klubo Julio Baghy, entuziasma peranto de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vien.

...mortis **D-ro Ferenc Szilágyi** (1895-1967). Li estis juristo, akademiano, sekretario de „Belartaj Konkursoj” de UEA, ĉefredaktoro de revuo Prismo – nome en 1936 li fariĝis sveda civitano. Li kunlaboris al Hungara Antologio, al Enciklopedio de Esperanto, al Sveda Antologio. Li tradukis hungaran poezion, krom kelkaj noveloj li prezentis travestitajn popolfabelojn en sia volumo „Trans la Fabeloĉeano”. Li aŭtoris bildsisteman lernolibron. Li estis multflanka esperantisto, organizanto de vigla kultura esperantista, lingvopedagogo ellaborinta memstaran instrumentodon, redaktoro kaj publicisto.

*

Antaŭ 35 jaroj...

... mortis **Elizabeta Baghy** (1891-1977), edzino de la genia poeto Julio Baghy. Ŝi precize kreis hejmon al la vagabonda poeto. Ŝi estis ne nur edzino – kaj patrino de ilia filo –, sed grava kunlaboranto de la poeto edzo: ŝi estis prizorganto de liaj manuskriptoj kaj la preparanto de liaj libroj.

...mortis **Pál Balkányi** (1894-1977), kiu estis disvastiganto de Esperanto, kunfondinto de Hungara Esperantista Societo Laborista

(HESL); kunredaktoro de Literatura Mondo; kunlaboranto de periodaĵoj Hungara Vivo, Juna Amiko, Paco; kursgvidanto.

...**mortis Tibor Újlaki-Nagy** (1915-1977), aŭtoro de „La Sporta Lingvo en Esperanto”.

*

Antaŭ 30 jaroj...

...**mortis André Blondeaux** (1913-1982). Li estis franca fervojisto, esperantisto. Li preskaŭ sola tradukis la teknikan leksikonon de la Francaj Ŝtataj Fervojoj al Esperanto. Li tiam fariĝis daŭra eminenta kunlaboranto de la Terminara Komisiono de IFEF. Lia kunagado esence kontribuis al la progresoj de tiu tereno. Krome li verkis kaj tradukis multajn teknikaj artikolojn, i. a. la fakprelegon de la 21-a IFK (Avignon 1969) pri la grandaj rapidecoj. Li kunlaboris en la statutkomisiono de IFEF.

...**mortis Mihály Sárosy** (1893-1982). Li estis aktoro kaj kanzonisto-gitaristo; eminenta membro de la iama „Gaja Scenejo” en Budapeŝto. Li finis studojn de kantisto-aktoro en la ĉefurba aktorlernejo. Dum la unua mondmilito li renkontiĝis kun Julio Baghy en siberia militkaptitejo, je lia efiko Sárosy fariĝis esperantisto. Reveninte el Siberio li intense ekagis por la progreso de la hungarlanda Esperanto-movado. Li estis aktiva kunlaboranto de Literatura Mondo. Oni tenis lin „Esperanto-trobadoro” en la tuta Esperantujo, li famiĝis ankaŭ kiel muzikkomponisto de poemoj de Julio Baghy. En la 29-a UK en Budapeŝto (1929) li rolis en la teatraĵo de Jenő Heltai: „La paĝo de l’ reĝino”. Post la dua mondmilito li ofte rolis en Esperanto-aranĝaĵoj.

*

Antaŭ 25 jaroj...

...**mortis D-ro István Szerdahelyi** (1924-1987), sciencisto, entuziasma adepto kaj batalanto de Esperanto, filologo, universitata profesoro. Li verkis serion de lernolibroj; sciencajn kaj popularajn verkojn por kaj per Esperanto. Li plenumis gravajn gvidajn funkciojn kaj en fakaj kaj en Esperanto-movadaj medioj. Li estis delegito, akademiano, kaj Honora Membro de UEA. Li organizis kaj ĝismorte estris la Esperanto-Katedron de la Budapeŝta Universitato. Li estis kunlaboranto de la Instituto por Kibernetika Pedagogio en Padenborg.

*

Antaŭ 15 jaroj...

...**mortis Edit Dombovári** (1942-1997) fervoja inĝeniero. Ŝi estis kunfondinto kaj estrarano de la „Fervojista Fakgrupo Landler Jenő” ĉe la Landler Jenő Veturilriparejo. Ŝi estis talenta organizanto, dum jardekoj ŝi diligente kaj ekzemplodone laboris per kaj por fervojista Esperanto-movado.

*

Antaŭ 5 jaroj...

...**mortis Ada Csiszár** (1920 -2007), kiu estis fervora, fidela, nelacigeble diligenta kunlaboranto de Kalocsay, kolektanto kaj fleganto de Kalocsay-heredaĵoj, tiu de la Kalocsay-postrestaĵoj. Tiucele ŝi fondis kaj entuziasme funkciigis la organizaĵon „Amika Societo de D-ro Kálmán Kalocsay”, kaj ĝismorte ŝi estis fervora motoro de tiu.

...**mortis Mihály Gergely** (1921-2007). Komence li estis oficisto, soldato, ĵurnalisto, multfoje premiita verkisto (’Ordeno Kavalirkruco de Hungara Respubliko’; ’József Attila-Premio’, ’Kruco-Memormedalo’), li aŭtoris pli ol 70 librojn. Li estis prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio, la redaktoro de la revuo „Hungara Vivo”, same tiu de la hungarlingva „Eszperantó Magazin” poste „Világ és Nyelv”. Dum jardekoj obstine li batalis por la solvo de la multlingveco, por la akcepto de la neŭtrala peranta lingvo. Lia signifa verko estis sub titolo „Mia profesio estas la konscienco”.

...**mortis Antal Járó** (1924-2007), kunfondinto de la Fervojista Esperanto-fakgrupo de Nyíregyháza, estrarano de tiu, eĉ pli poste gvidanto de tiu, membro de Hungara Esperanto Konsilantaro, membro, respektive komitatano de Hungara Esperanto-Asocio. Li estis aktiva partoprenanto de la Esperanto-movado vivo en la Departemento Szabolcs-Szatmár de HEA. Li estis membro kaj fakdelegito de UEA. Regule li partoprenis diversajn Esperanto-aranĝaĵojn, kongresojn, aranĝis la 19-an Landan Amerikan Fervojistan Esperanto-Renkontiĝon (1982) en la urbo Nyíregyháza. Entuziasme li varbis membrojn por la movado, gvidis kursojn.

János Patay

DEKKVIN-JARA PASINTECO – KRISTANA FERVOJISTA LUKTADO

Dek kvin jaroj estas fluga momento, trakuranta ombro sur la granda muro de la Epoko, eble unusola ondoprapado sur la oceano de la Eterneco. Kiu scias, ĉu tio atingis la transan bordon, ĉu atingos iam? – skribis la pastoro D-ro Dezső Fónyad pri la 15-jara historio de Asocio „Soli Deo Gloria” (Gloro sole al Dio). Konsidere, ke post 79-jara paŭzo ĝuste en la moderna misia centro de la Asocio de la Kristanaj Fervojistoj gastigos la jaran konferencon de IRM (International Railway Mission – Internacia Fervojista Misio), pro tio mi klopodas koncernigi la ideojn de D-ro Dezső Fónyad je la 15-jara historio de nia asocio.

Jubileo ĉiam estas okazo je kalkulo, ĝojado kaj dankpreĝo. Oni kiel estas kurioza, ja post tiom mallonga periodo sia 15-jara laboro ŝajnas plibeliĝi, nome la rezultoj de la hungara ekumena fervojista misio. Se niaj okuloj povas malfermiĝi je la helpopeto de la Sankta Spirito de Dio, objektive ni povas konstati, ke tiuj 15 jaroj – malgraŭ siaj stumbladoj, daŭra lukto kontraŭ la minacoj de ĉesigo – la falema vivo de la Asocio de la Kristanaj Fervojistoj estis manifestiĝo de granda indulgo de Dio.

Niaj 15 jaroj estis similaj al la baraktado de Jakobo ĉe Edomo, kie hejmeniranta, kontraŭ siaj pekoj kaj timoj luktanta, al sia naskolando retiranta homo balatis kontraŭ Dio. Jakobo riĉiĝis en fremdlando, sed li volis returni sin al sia pralando por vivi kaj morti. Li timas pro la kulpoj faritaj kontraŭ siaj propraj patro kaj frato, kaj demando aperis en li: kiel akceptos lin sia frato Esavo? Tiu ĉi timo ne forlasis lin ĉe la vadejo de Jakob. Por repacigo la anticipe senditaj donacoj kaj lia multnombra familio jam estas sur la transa bordo de la rivero, sed dum mizera nokto li luktas kun Dio, aperanta en la malhelo de la silento. Dio instigas Jakobon je lukto. Antaŭ la aŭroro Dio volas malaperi, kaj la kokso de Jakobo elartikiĝis. Jakobo kaptas Dion kaj diras: „Mi ne forliberigos vin, antaŭ ol vi benos min”. Dio akceptas la peton de Jakobo. Sekve de tio Jakobo lame atingas la transan bordon, kie Esavo bonvole, kun amo akceptas la hejmenirantan fraton kaj lian familion.

Nia 15-jara kristana fervojista historio similas al la baraktado de Jakobo, kio el la indulgo de Dio eĉ hodiaŭ daŭras. Antaŭ 15 jaroj niaj 17 fondintoj simile ekiris sian vojon el la kultursalono de la Orienta Stacidomo, por ke ili atingu simbolan teron de Dio, al la komunio de la gefratoj, ĉar ili satoriĝis pri la „sklaveco de Babilonio”, la longan ateistan periodon, la fremdajn diojn, kiuj depost la dua

mondmilito loksidiĝis sur la vivon de nia nacio kaj hungaraj fervojistoj.

La katolikaj, kalvinanaj, luteranaj, baptistaj, metodismaj kaj pentekostismaj fervojistoj aliĝis al nia ekumena asocio; la membraro nombras pli ol cent. Multaj forestantaj fervojistoj nomis nin frenezuloj, kiel iam la prefekto Festus la apostolon Sanktan Paŭlon en Cezareo. Ni humile toleris tiun ĉi mokadon, ja nur frenezuloj povas havi tiun Kristo-kredon, kiu entreprenas foresti la ideon de samseksemo, la mondon de komfortaj foteloj antaŭ TV- kaj video-aparatoj; kaj ili volas reiri al siaj forgesinta-forgesigita Dio, kaj al Lia Filo, Jesuo Kristo.

Vere, nur la frenezuloj de Dio ne volas rezigni – eĉ per giganta lukto –, por ke ili renkontiĝu kun Dio kaj kun Lia Sankta Filo. Ili estas tiuj, kiuj rekonis, ke krom la penado en la eklezio oni devas forigi la malnovajn stumblojn/mispaŝojn, pekojn de la hungara nacio kaj meti antaŭ la piedojn de nia Savanta Sinjoro, ja kun nepardonitaj pekoj oni ne povas reveni al sia hejmo, eĉ sur la simbola fremda mondo oni ne povas pluekzisti. Oni rekonis, ke kune kun la ŝarĝo de pekoj oni ne povas flugi; eĉ surtere grimpante oni malfacile povas fortreni sin ĝis la kruco de Kristo.

Per diktaturoj submetita generacio volas suprengrimpi el la profundo de la kulpoj, ĉar sen tio oni ne povas progresi, eĉ ne kondukas vojo reen. Kun Dio ni devas lukti por tio, ke post la fino de la batalo – simile al Jakobo – ni kristanaj fervojistoj de la 21-a jarcento povu ricevi benon de Li. Ĉu ekzistas pli freneza decido? Ĉi tie ne temas pri malforta ŝatokupo, pri perspektiva partio, sed despli pri tio luktado, ke generacio ĉu kapablas trapaŝi tiun limon, kio forte puŝiĝas inter senreligia kaj kredanta hungara fervojistaro, inter sensema nacio kaj anima popolo.

Jakobo de kiu ricevis forton kaj instigon je hejmeniro? Ne el sia volo, ne el la volo de sia familio, sed de la Kreinto, Dio. Estas unusence, nur tiu havas ŝancon por reiri al sia patrujo, kiu de Dio ricevas forton je tio, ke post longdaŭra lukto la indulganta Dio benas liajn vivon, familion, eklezion, entreprenon, kristanan fervojistan asocion, nacion, kaj poste oni eksterdangere povos daŭrigi sian vojon. Oni bezonas animan purvidon, ke sub la soci-kultura premo de la 21-a jarcento oni rekonu: ĉie kaj ĉiutage ni estas ĉe la vadejo de Jakobo, kie en ĝusta momento ekŝrumpas la pasinto kaj estonto ekŝrumpas, oni devas decidi pri vivo kaj morto, pri niaj senkonscia hom-naturo kaj

renaskiĝo. Por realigi tion, malantaŭ la falangejoj de sciokolektaĵoj, senlaborecoj, sindetruantaj kulturŝanĝoj la (pro timo suferanta) fervojisto devas renkonti Dion. Estas bone scii, ke dume Dio multmaniere serĉas renkontiĝon kun ni. Vane ni kuŝiĝas de antaŭ Dio – kiel Adamo kaj Eva en la Edeno – en la denseco de plezuroj kaj pekoj, ni devas scii, tiu renkontiĝo ne estas evitebla.

La 15-jara historio de la Kristana Fervojista Asocio donas klaran ekzemplon, ke sen Dio oni ne havas rezultan vivon. Nur la renkontiĝo kun Dio povas montri ĝustan direkton al la fervojistaj kolektivoj de la nova jarmilo. Pro tio ni entreprenis la misfaman senhonorigon de niaj kolegoj: „frezuloj de Dio”, pro tio ni luktis kaj batalos plu kun Dio, kaj simile al Jakobo ni diras: „Mi ne forliberigos vin, antaŭ ol vi benos min”. Oni devas scii, Dio benas nur tiujn, kiuj reduktas siajn memon, memfidecon por ke Jesuo altiĝu en ili. La kristanaj fervojistoj devas ĝoje fanfaroni, ke ili havas Dion, kiu donis Savanton, Kriston, Redemptoron; ja ankaŭ nia slogano sonas jene: „Dio estas amo”.

Ni havas specialan batalon, kion ni, kristanaj fervojistoj luktas kun la amanta Dio, kiu fortigas, benas nin en tiu ĉi batalo. Pro tio ne eblas laciĝi en tiu ĉi luktado. Ni devas malaperigi niajn orgojlojn, senkonscian naturecon. Nia senkonscia naturo devas neniigi sur la batalkampo, ĉiutage oni devas kondamni je morto. Tio estas la prezo, por ke en Kristo konfirmante ni ekiru al sekura estonto. Ĉio

ĉi ŝanĝigas la vivon, la homo restas sama, sed aliiĝas la vivo, la karaktero fariĝos pli humila kaj pli estiminda, pli firma estos la kredo. Se ni iradas en la misio de Kristo, ni kliniĝas ĝis la tero antaŭ Dio, sed antaŭ homo neniam.

Oni povas demandi: kiu estas tiu fervojista kolego, kiu bedaŭras la kredon al Dio, kiu ekhavis malpli ĝojon, kiun bremsis en sia laboro kaj devo tiu fakto, ke li aliĝis la la Kristana Fervojista Asocio? Neniu!!! Eĉ en la laborejo li faras siajn deĵorajn taskojn pli precize, ekzemplodone kaj kontribuas al la pretendoj de la evoluiĝanta fervojo de la 21-a jarcento. En la okuloj de la mondo ili estas la „frezuloj de Dio”, sed venkantoj kun Kristo.

Niaj 15-jaroj estas nur ondofrapado ĉe la pordo de la eterneco, sed ni devas firme kredi – simile al Jakobo – eĉ por ni alvenos la aŭroro, kaj kvankam strumladante, tamen kun ĝojanta kaj dankanta koro ni fanfaronas al la fervojistaro, al nia nacio, ke Sinjoro benas kaj fortigas nin. Gloro estas Sole de Dio!

Károly Orosz
(emerita inĝ.)

Prezidiano de Kristana Fervojista Asocio
*

Noto de la redaktoro: Vidu artikolon en HFM n-ro 1/2008 p. 12. sub la titolo „Internacia Kristana Fervojista Misio”

FAKAJ INFORMOJ

Neregula lerneja studhorro pri la pureco de MÁV

En la kadro de la kampanjo de MÁV „Pure ni kuregu” MÁV-ensemblo aranĝis neregulan klasestran studhoron por la lernantoj de la budapeŝta „Than Károly Ekologilernejo”. Oni alvokis la atenton de la lernantoj je la gravega signifo de la pureco de la fervojo. La studhoron kunlaboris du mediumoj: Andrea Kandrász rakontis kelkajn proprajn travivaĵojn por argumenti la celon de la kampanjo „Pure ni kuregu”; Sándor Badár humoristo per rolo – citante la ĝenron de „stand-up comedy” – atentigis la gelernantojn pri la damaĝo de la grafikaĵaĉo. La forigo de tiuj malpurigoj bezonas multajn homajn fortojn kaj altajn financajn fontojn. Li rakontis sian iaman travivaĵon, per kio li prezentis kiel grave estas, ke la pasaĝeroj kontribuu al la pureco de la fervojo.

*

La 5-a Landa Fervojista Sangodona Tago

Decembre la Hungaraj Ŝtatfervojoj kaj la Hungara Ruĝa Kruco komune aranĝis la 5-an Fervojistan Sangodonan Tagon. En la iu plej ampleksa sangodona akcio 567 pasaĝeroj kaj fervojistoj kontribuis al la ekvilibra kaj daŭra sangoprovizado de la kristnaska tempoperiodo per sia donajo, nome per propra sango. Dum la jam tracidia Landa Fervojista Sangodona Tago la Hungaraj Ŝtatfervojoj kaj la Hungara Ruĝa Kruco sur 16 stacidomoj atendis la noblajn donacantojn.

*

Interkonsento de MÁV-Trakcio kaj Rail Cargo Hungaria

La Rail Cargo Hungaria (RCH – vartransporta filio de MÁV) subskribis skizan kontrakton kun MÁV-Trakcio pri la uzo de trakciaj liveradoj, kiu validas ĝis la jaro 1916. Laŭ la kontrakto RCH entreprenas, ke la plej parton de la trakcia bezono

mendas ĉe MÁV-Trakcio. La du entreprenoj ĉiujare anticipas akordigos la tutjarajn trakciajn volumenojn, ambaŭ aplikas komunan softveron por mezuri la plenumon, ili kunlaboras ankaŭ en ceteraj rilatoj (ekz. optime manipuli de trafikpintojn kaj ŝarĝojn). La kontraktantoj precizigis la trakcian tarifon de la liverado laŭ reciproka konsidero de la merkataj rilatoj kaj komercaj interesoj.

La nun aprobita skiza kontrakto estas la unua rezulto de la strategia kunlaboro inter ÖBB kaj MÁV. La gvidantoj de la du naciaj fervojaj entreprenoj preparos pliajn interkonsentojn, ke krom la altigo de la kvalita nivelo ambaŭ kompanio longdaŭre certigu profitdonan liveradon inter la cirkonstancoj de la eŭropa fervojmerkata konkurso.

*

Komuna bontenada entrepreno

La MÁV Trakvetulirara Servo kaj ÖBB TS (Aŭstra Bontenada Entrepreno) aprobis kontrakton pri komune fondi bontenadan entreprenon. La nova entrepreno sub nomo „TS-MÁV Gépészet Services KFT” bontenados la ŝarĝvagonojn de Rail Cargo Hungaria ZRT (RCH). Ekde j. 2012 oni riparos tiujn en la ŝarĝvagonaj riparaj uzinoj de MÁV-Gépészet Zrt, en Budapest-Ferencváros, Győr, Pécsbánya-rendező, Gyékényes, Dunaújváros, Hatvan, Füzesabony, Fényeslitke, Kelebia kaj Békéscsaba.

Dum la preparo de la nova entrepreno oni prilaboris la detalaĵojn de la operativaj laborprocezoj, la evoluigan strategion de la riparaj uzinoj. Ĉi-tiuj garantias altan riparitan kvaliton.

La centro de la nova entrepreno rezideas en la uzino de Ferencváros, ĝiaj dungitoj estas eminentaj veturilriparaj kaj -bontenadaj fakuloj, ĝenerale regantaj la germanan lingvon.

Krom la bontenado de ŝarĝvagonoj ÖBB kaj MÁV-Gépészet traktas pri la mendoj de ĉefrevizio de ŝarĝvagonoj, riparoj de lokomotivoj kaj pasaĝervagonoj, kaj pri mendo de elektraĵoj motoroj, kiu povos kreskigi la proporciojn de la enspezoj.

*

Estas malpermesite fumi

Ekde la 1-a de januaro 2012 estas malpermesite fumi sur la tuta areo de la hungara fervojo (objektumoj de la fervoja liverado, stacidomoj, stacioj, fervojaj haltejoj kaj sur ĝiaj kajoj, ĉiu pasaĝertrajno). Jam oni transformigis la pli fruajn vagonojn por fumantoj, oni devis forigi la cindruojn de pli ol 400 vagonoj. En la pasaĝervagonoj per tabuletoj oni alvokas la atenton pri la laŭleĝa totala fumad-malpermeso.

La nova regulo preskribas novajn taskojn kaj devojn al la konduktoroj, nome ili devas alvoki la leĝ-rompantojn por tuj ĉesigi la fumadon. Se la fumanto ne obeas, li/ŝi puneblas je okmil forintoj, resp. descendigas. Laŭ tiu ĉi leĝ-modifo la koncernaj fervojaj deĵorantoj devas alvoki la leĝ-rompantojn por ĉesigi, kaze de malobeo la fumanto devas legitimi sin al la deĵoranto.

Inter la membroj de la EU-landoj en Hungario oni defendas la nefumantojn per la plej rigora regulo.

*

Malkreskiĝis la funkcia elspezo de MÁV

En j. 2011 pli ol 12 miliardajn Forintojn malkreskiĝis la funkcia elspezo de MÁV Grupo, kompare tiun al la 2010-jara elspezo, anoncis Ferenc Szarvas, prezidanto de MÁV. Ĉiurilate MÁV celas efektiviĝi liverad-vidmanieran entreprenon, kio ĉiam pli bone liveradas, la gvidantaro de la nacia fervojkompanio devigas sin kreskigi la nivelon de la liverado kaj pli profitan ekonomion.

La ĉefa ideo estas ĉesigi la paralelecon inter la unuopaj grupoj, profite evoluigi la teknologion, malkaŝi kaj utiligi la rezerveojn de la organizo, solvi la taskojn per propraj rimedoj kaj propraj fortoj. MÁV deziras utiligi eksterajn specialistajn kaj vicentreprenistajn liveradojn nur tiukaze, se tio ne estas solvebla el propra forto. La reorganizado de la katenario-konservado estas grava ekzemplo je tio. Per tiu sistemo MÁV povos akiri ĉ. du miliardojn da pli frua malprofito.

En 2011 per la novaj kontraktoj Záhony-Port 15 %-jn kreskigis la enspezojn, MÁV Informatiko akiris 150 milionajn Forintojn de malpli elspezo.

MÁV-START Zrt en jaroj 2010-2011 akiris enspez-kreskiĝon entute 2,2 miliardajn Forintojn da kresko de enspezo, krome 1,3 miliardojn da malkresko (per ĉesigo de eksteraj laborfortoj).

MÁV-Gépészet (Maŝinprovizo) ŝparis 1,5 miliardojn per traorganizado de la riparejaj laborejoj kaj vendo de superfluj instrumentoj.

MÁV-TRAKCIO Zrt ŝparis 1,1 miliardojn per energiŝparado.

*

Longdistanca strategia kunlaboro

MÁV Grupo kaj ÖBB Holding AG rezultohave finis pritraktad-serion kaj subskribis interkonsenton pri longdaŭra kunlaboro, kio difinas la kunlaborajn terenojn por la sekvaj jaroj.

Tiu ĉi kunlaboro plibonigas la funkciajn efikecon kaj liveradan nivelon de ambaŭ societoj, la komuna kondutmaniero firmigas la komercajn poziciojn de

ambaŭ firmoj. La Strategia Kunlabora Interkonsento projekcias diversajn kunlaborojn en la temo de la estonta pasaĝertrafiko, trakciado kaj mekaniko. La du firmogrupoj estigas konstantan direktantan korporacion por kunordigi kaj taksi la kunlaboron.

Tiu ĉi kunlabora interkonsento (inter MÁV kaj ÖBB) povos plifortigi ne nur la hungaran merkaton, sed tiu povas fortiĝi ankaŭ en la tuta regio de Sud-orienta Eŭropo. La aŭstra fervojkompanio, nome la Rail Cargo Aŭstria, kaj ĝia filio, la Rail Cargo Hungária jam havas merkatajn poziciojn.

*

Rusaj motorvagonoj

La ĝemel-motorvagonoj – serio 6321 – alvenis al MÁV (en 2003) por parte egaligi la rusan ŝtatŝuldon. Oni planis funkciigi tiun tipon por antaŭurba trafiko. Koncerne la funkciigon de la veturilo, la elektromekanikaj distribuoj apartenis al la nivelo de la 1970-aj jaroj, la elektronikaj ekipaĵoj memorigas je la 1990-aj jaroj. Dum la funkciigo evidentiĝis funkcia perturbo; nome se la patrinplato de la regada komputilo difektas, la komunikada kanalo haltas. La komunikada difekto – bedaŭrinde – estas ĉiutaga problemo, kio kaŭzas kontinuajn trajno-malfriiĝojn. Neeblas akiri novajn regadkomputilajn patrinplatojn, la riparado de difektitaj estas longedaŭraj.

Plia mankhavo de la regadkomputiloj estas, ke tio ne disponas erarejon. La regadkomputilo ne havas aŭtomatan veturil-identigilon, pro tio la lokomotivestro ĉiukaze devas permane nutri la registran numeron de la veturilo al la teleregilo.

Por ĉesigi la menciitajn mankhavojn oni planas ekirigi la regadkomputilajn sistemojn de la veturilposedanto, -funkciiganto kaj -fleganto. La MÁV-Trakveturilara Servo entreprenis efektiviĝi la taskon.

*

Győr estas grava fervojnodo

La fervojnodo Győr estas la plej frekventata trafika nodo de la Transdanubio. El kvin direktoj renkontiĝas la fervojlinioj. Oni komencis konstrui la fervojojn dum la unua duono de la 19-a jarcento. La Ŝtata Fervoja Kompanio (1846-1894, resp. Hungaraj Ŝtata Fervojoj ekde 1894) inter la unuaj ekfunkciis la fervojlinion la 24-an de decembro 1855 Győr-Hegyeshalom-Miklóshalma (nun Nickelsdorf)-Pándorf-Bruck-Királyhida (78 km); la 10-an de aŭgusto 1856 la linion Komárom (antaŭe Újszőny)-Győrszentiván- disvojiĝo-Győr

ranĝostacio Győr (37 km); la 1-an de oktobro 1871 la linion Győr-Győr ranĝostacio-Győrszabadhegy disvojiĝo - Győrszabadhegy - Pápa - Celldömölk-Ostffyasszonyfa - Bajt disvojiĝo - Sárvár - Porpác - Szombathely (117 km); la 3-an de januaro 1891 la linion Győr-GySEV- disvojiĝo - Csorna - Kapuvár - Fertőszentmiklós - Sopron (86 km); la 11-an de aŭgusto 1896 la linion Győr - Szabadhegy - Veszprémvarsány - Bakonyszentlászló (35 km).

Laŭ la 1867-jara kompromiso la afero de la fervojo komplete apartenis al la agosfero de la hungara kabineto kaj leĝdonado, kaj post 1867 tiu branĉo rapide progresis. Dum la epoko de la vaportrakciado la lokomotivejoj de Komárom, Győr, Hegyeshalom disponigis senmankan funkcion de la fervojaj veturiloj. La fervojreto kaj la veturilstoko signife malkreskis pro la pacdiktaĵo de Trianon. Pli poste komenciĝis evoluigoj, en 1926 oni konstruis la duan trakon inter Győr kaj Hegyeshalom. Laŭ la fazkonvertila sistemo de Kálmán Kandó en 1933 oni elektrizis la fervojlinion Budapest-Hegyeshalom. En tiu tempo komenciĝis ankaŭ la dizelmotora trakciado.

En la urbocentro situanta lokomotivejo de Győr – pro bomb-atako – en 1945 kvazaŭ neniigis, sed en 1949 oni rekonstruis ĝin. Tiutempe la lomomotivejo de Győr famis ankaŭ pri sia hortikulturo, ĝi fieris pri sia florĝardeno kun fontano.

Multaj transformiĝoj okazis ĉe la fervojo, en 1945 la trakcia servo estis subordigita organizaĵo de la Direkcio. En 1949 estiĝis regionaj fervoj-direktoj, la trakciaj aferoj apartenis al la sekcio n-ro IV. En 1980 oni modernigis la organizon de MÁV, estiĝis Regionaj Funkciaj Administracioj (estrecoj), en 1987 Trakcia Administracio (estreco), poste Maŝinproviza Administracio (estreco) de Győr, fine antaŭ-nelonge oni nomas ĝin Regiona Trakci-liverada Centro de Maŝinproviza Fakadministracio.

Inter la jaroj 1958-1961 konstruiĝis kaldronega konstruaĵo, en kiu du karbohejtaj kaldronegoj funkciis ĝis la j. 1999. En 1987 ekfunkciis sestraka lokotiv-ripara halo. La apude situanta konstruaĵo funkciis kiel fervoj-deĵora kazino, nuntempe ĝi transformiĝis je oficejo. La lokomotivejo de Győr ekde longa tempo faras siajn taskojn, teknikan flegadon kaj riparadon de trakciaj kaj trenataj veturiloj.

Okaze de tiu konciza retrorigardo pri la historio de fervojnodo Győr, speciale pri la lokomotivejo, oni nepre decas menci, ke la antaŭ unu jaro forpasinta nia samideano Imre Nováki siatempe estis ankaŭ estro de tiu lokomotivejo.

*

Kompilis: **János Patay**

PRIMEMORO PRI FERVOJISTA KULTURO

„Pli bone malfrue ol neniam” – konstatas hungara onidiro. Oni ne havas pli ĝustan klarigon pri la malfruiĝinta rememoro. Pasintjare okazis centjara jubileo de la fervojista kulturo en urbo Pécs. La 22-an de junio 1911 fondiĝis „MÁV Ébredés Dal- és Önképzőkör” („MÁV Vekiĝo Kanto- kaj Memkleriga Rondo”), kiun poste sekvis ceteraj pliaj memklerigaj rondoj. La „Asocio de Hejmo de Fervojistoj en Pécs” („Vasutasok Otthona Pécs Egyesülete”) funkciis en la kulturdomo. Esplorante la postrestintan statuton konturiĝas la celo de la asocio: nome rezervado de la libertempa amuziĝo de fervojistoj, nome laŭ la cito: „malpermesata estas konversacii pri la fervojo kaj pri la politiko!”

Ankaŭ nun okazas multaj tiuj kulturaj aktivadoj programoj, kiuj donas ripozon al multaj, kaj dum longa tempospaco donis/donas artajn plezurojn egale al fervojistoj kaj civiluloj.

Oni nepre devas emfazi la aktivadon de la Fervojista Koncert-Blovorkestro de Pécs. La radikoj de la orkestro devenas el tiu tempo, kiam tiuj post la dua mondmilito inter la fervojistoj aperis la pretendo de la komuna muzikado. Komence ili rolis kun la miksa ĥoro – kiu intertempe disiris –, kaj dum la lastaj jardekoj en Pécs nur tiu orkestro konservas la muzikajn tradiciojn de la fervojistoj. Dum tiuj pasintaj jardekoj la orkestro rapide evoluis. Ekde 1983 la Liszt-premiita Károly Neumayer estas la kapelestro, kiu kvazaŭ en sia infanaĝo – kiel devenlinie daŭriganto – estas la plej bela fervoja muzika tradicio.

La orkestro akiris sian pli gravan enlandan sukceson en 1984, kiam ĝi ricevis la kvalifikon *koncerta orkestro*. Ekde tiam la orkestro regule rolas ankaŭ eskterlande. El tiuj roloj oni nepre devas mencii, ke en 1990 ĝi gajnis la unuan premion en Ostrava (Ĉeĥio) dum la Granda Blovorkestra Festivalo; en la jaro 1992 en Bemberg (Germanio) konkursis 173 orkestroj el la tuta mondo, kaj tiu ĉi blovorkestro gajnis la unuan premion. Sekvajare en urbo Riva del Garda (Italio) la orkestro gajnis ĉiun gravan premion.

En majo de 1994 la orkestro en la kategorio show akiris la kvalifikon *Internacia Festivalorkestro*. La Hungara Radio faris plurajn surdiskigojn kun la orkestro.

La membroj de la orkestro apartenas al la pli juna aĝoklaso, sed favore kompletigas ilin la konforma nombro de la pliaĝuloj.

La orkestro – krom multaj naciaj kaj internaciaj rekonaj – ricevis Csokonai-premion en 2002. Ilia speciala rekono estas, ke antaŭ du jaroj, en 2010 ricevis la titolon „Kultura Ambasadoro de Pécs 2010 Kultura Ĉefurbo de Eŭropo”.

En la partoprenintoj de la 47-a Kongreso de IFEF eĉ nun reeĥas tiu travivaĵo, kiun ili travivis kaj gajnis dum la speciala koncerto de la Blovorkestro de MÁV de Pécs, ja tiu donis riĉan programon, ne nur marŝojn aŭ valsojn, sed ankaŭ uverturojn kaj partojn el operoj. Kulminis la sukceso, ja ne nur la aŭskultantoj ĝuis la muzikon, sed radiis la ĝojo ankaŭ de sur la vizaĝo de la muzikistoj, orkestranoj.

En la kulturdomo funkcias diversaj fakaj rondoj: ekde 42 jaroj la klubo de enigmo-solvantoj estas tre populara, multnombraj individuaj solvantoj kaj teamoj partoprenas organizitajn konkursojn. La kulturdomo rezervas hejmon por briĝklubo, fikaj-kudranta klubo, arto-amika klubo kaj klubo de pensiuloj, eĉ klubkunveno de la fervojistaj esperantistoj.

Dum la pasintaj cent jaroj ŝanĝiĝis ankaŭ la postuloj/pretendoj de la publiko. La kulturinstitucio konformiĝis al la novaj bezonoj, rezervis lokon al e-centro, fondiĝis la klubo de komputilumado por geavoj.

Pro ekonomiaj problemoj, mankoj de finanĉaĵoj la instituto devis rezigni pri kelkaj iamaj programoj, antaŭ kelkaj jaroj ĉesiĝis la József Attila deklamkonkuro, konkursoj de infandeseĝnado, novelo- kaj fabel-verkado, resp. infantaga aranĝaĵo. Anstataŭ tiuj ĉiujare oni aranĝas Nikolao-feston por infanoj.

Okaze de la centjara jubileo pasintjare la Kulturdomo ekirigis programserion, tiun komencis subĉiela koncerto de la blovorkestro, aŭtune okazis arta ekspozicio de Art-Amika Klubo, la ekspozicio estis spektebla eĉ per interneto. La ekspoziciantoj post ĉiu tri semajnoj ŝanĝas unu la alian. La unua artisto de la serio estis Sándor Dézsi, fakoficisto de MÁV-Start Zrt. sub la titolo „De ebena ĝis 3D”. Cetera dum la inaŭguro de la ekspozicio li prezentis sin ankaŭ kiel poeto. Zoltán Vally ekspoziciis sub titolo „Estintaj memoroj de Oxford”, poste István Kardos kun titolo „Periodo el mia vivo”.

Krom la meniciitaj okazas multaj ceteraj eventoj, ja la organizantoj klopodas prezenti la plej ŝatatajn programojn por ĉiu aĝogrupo.

János Patay



ICE trajno en Germanio



ALVOKO

La 64-a Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio okazos de la 19-a ĝis la 25-a de majo 2012 en la germana urbo **Herzberg**.

Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

VENU KONGRESI AL GERMANIO!